PASKO – 4an de aprilo 2010

RESTU ĈE NI, ĈAR ESTAS PRESKAŬ VESPERE – Komentario al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

Lk. 24, 13-35

Kaj jen, en tiu sama tago,[la unua el la semajno] du [el la disĉiploj] iris al vilaĝo nomata Emaus, kiu estas malproksime de Jerusalemo preskaŭ dekunu kilometrojn kaj ili interparolis inter si pri ĉio tio, kio okazis. Kaj dum ili interparolis kaj diskutis inter si, Jesuo mem alproksimiĝis kaj iris kun ili. Sed iliaj okuloj estis malhelpataj tiel, ke ili lin ne rekonis.

Kaj li diris al ili: Kiaj vortoj estas tiuj, kiujn vi interŝanĝas, dum vi iras? Kaj ili haltis, kun malgaja mieno. Kaj unu el ili, nomata Kleopas, responde diris al li: Ĉu nur vi sola loĝas en Jerusalem, kaj ne scias tion, kio tie okazis en ĉi tiuj tagoj? Kaj li diris al ili: Kion? Kaj ili diris al li: Pri Jesuo, la Nazaretano, kiu estis profeto potenca age kaj parole antaŭ Dio kaj la tuta popolo; kaj kiel la ĉefpastroj kaj niaj regantoj transdonis lin por kondamno al morto, kaj lin krucumis. Sed ni esperis, ke li estas tiu, kiu elaĉetos Izraelon. Kaj plie, krom ĉio tio, hodiaŭ estas jam la tria tago, de kiam tio okazis. Ankaŭ mirigis nin iuj virinoj el inter ni, kiuj estis frumatene apud la tombo, kaj ne trovinte lian korpon, revenis, dirante, ke ili ankaŭ vidis vizion de anĝeloj, kiuj diris, ke li vivas. Kaj iuj el nia kunularo iris al la tombo, kaj trovis tiel, kiel diris la virinoj; sed lin ili ne vidis.

Kaj li diris al ili: Ho malsaĝuloj kaj kore malviglaj por kredi ĉion, kion la profetoj antaŭparolis! Ĉu la Kristo ne devis suferi ĉion tion, kaj eniri en sian gloron? Kaj komencante de Moseo kaj de ĉiuj profetoj, li klarigis al ili el ĉiuj Skriboj la dirojn pri li mem.

Kaj ili alproksimiĝis al la vilaĝo, kien ili iris, kaj li ŝajnigis al ili, kvazaŭ li pluen iros. Kaj ili retenis lin, dirante: Restu ĉe ni, ĉar estas preskaŭ vespere, kaj la tago jam malkreskas. Kaj li eniris, por resti ĉe ili.
Kaj dum li sidis kun ili ĉe manĝo, li prenis panon, kaj ĝin benis kaj dispecigis kaj donis al ili. Kaj iliaj okuloj malfermiĝis, kaj ili rekonis lin, kaj li fariĝis nevidebla por ili. Kaj ili diris unu al alia: Ĉu nia koro ne brulis en ni, dum li parolis kun ni sur la vojo, dum li klarigis al ni la Skribojn?
Kaj leviĝinte en tiu sama horo, ili reiris al Jerusalem, kaj trovis la dek unu kunvenintaj, kun siaj kunuloj, kaj dirantaj: La Sinjoro vere leviĝis, kaj aperis al Simon. Kaj ili rakontis tion, kio okazis sur la vojo, kaj kiamaniere li rekoniĝis al ili en la dispecigo de pano

Neniu evangeliisto priskribas la resurekton de Jesuo, sed ĉiuj oferas la eblecon Lin renkonti resurektinta. Sankta Luko tion faras pere de la rakonto pri la disĉiploj de Emaus.

La evangeliisto skribas ke "en tiu sama tago, [la unua el la semajno]", ĝi estas la tago de la nova kreo, tiu definitiva, tiu kiu neniam plu malaperos, "du el ili iris al vilaĝo". Jen kiam en la Evangelioj ni trovas la vorton "vilaĝo" ĝi ĉiam havas negativan signifon; la vilaĝo estas la loko de la tradicio, la loko rifuzanta la novaĵon alportitan de Jesuo.

Kaj tiu ĉi vilaĝo havas eĉ nomon, ĝi nomiĝas Emaus. Tiu nomo Emaus aperas nur unu fojon en la Malnova Testamento en la libro de Makabeoj kie oni rememoras la venkon de Dio plenumitan fare

de Judas Makabeo kontraŭ la paganoj, kaj estas ĝuste en tiu ĉi libro de Makabeoj, memore al tiu venko, ke oni rememoras: “tiam ĉiuj nacioj ekscios ke ekzistas tiu kiu elaĉetas kaj savas Izraelon”.

Do, Emaus estas la loko de la venko de Dio kontraŭ la paganoj, ĝi estas la loko de la liberigo. Kaj ili iras tien kaj la evangeliisto indikas ke “ĝi estas malproksime de Jeruzalemo preskaŭ dekunu kilometrojn”, kaj la evangeliisto uzas la sanktan terminon Jeruzalem, kiu indikas la sanktan urbon.

Nu, tiuj disĉiploj iras seniluziiĝintaj, malĝojaj, senkuraĝigitaj kaj, kiam ili renkontas vojaĝanton kiu alproksimiĝas al ili, tuj ili diras al li ke ili esperis ke Jesuo liberigos Izraelon, ĉar estas ĝuste tiu kiun ili atendas. Tiu viro kiun ili konis kaj kiun ili indikas kiel la Nazaretanon nome kiel regionanon el tiu regiono de ribeluloj aŭ kiel profeton, sed ili ne komprenis ke estas ĝuste Li la novaĵo.

Ili ne komprenis ke Jesuo venis por starigi la Regnon de Dio, ili atendas la restarigon de la regno de Izraelo, eĉ post la resurekto de Jesuo, post kiam Jesuo dum kvardek tagoj parolos pri la Regno de Dio, ili pripetos al Li: “sed kiam vi restarigos la regnon de Izraelo?”.

Ili ankoraŭ estas alkroĉitaj al la pensmaniero de la pasinteco, kaj oni tion vidas el la maniero laŭ kiu ili priparolas la aŭtoritatuloj, ili diras: “la ĉefpastroj kaj niaj regantoj”, ili konsideras kiel siajn regantojn tiujn kiuj mortkomdamnis kaj krucumis Jesuon.

Kaj tiuj du uloj aldonas: “vere iuj virinoj el inter ni, kiuj estis frumatene apud la tombo, kaj ne trovinte lian korpon, revenis, dirante, ke ili ankaŭ vidis vizion de anĝeloj, kiuj diris, ke li vivas,” sed ili sin detenas diri ke ili ne kredis je la virinoj, ĉar ili opiniis ke temas pri deliraĵo.

Nu, jen ke tiumomente Jesuo enŝoviĝas per riproĉo, per vere akra riproĉo, ilin Li nomas stultuloj, malsaĝuloj kaj kore malviglaj kaj Li komencas de Moseo kaj de ĉiuj profetoj, li klarigas al ili el ĉiuj Skriboj la dirojn pri li mem”. Kiel do estas Jesuo kiu devas klarigi al ili la Sanktajn Skribojn? Ĉu ili mem ne kapablis atingi la klarigojn ? Tute ne, ĉar por kompreni la Sanktajn Skribojn, por kompreni la vorton de Dio oni devas ĝin legi per la okuloj de la amo kiuj vidas la bonon de la homo kiel absolutan valoron; nur tiamaniere oni komprenas tion kio estas skribita en la Sanktaj Skriboj; alikaze ne nur oni ne ĝin komprenas, sed oni eĉ riskas doni al ĝi kontraŭan signifon.

Nu, “Kiam ili alproksimiĝis al la vilaĝo, kien ili iris”, la evangeliisto substrekas ke ili volas reiri al la loko de la tradicio. Ili esperis ke Jesuo estos la liberiganto, kvankam ili daŭras esperi je nova liberiganto, Jesuo ŝajnigas devi pluen iri, Jesuo antaŭeniras al la novaĵo, li ne haltas kaj ne retroiras al la malnovaĵo.

Sed ili insistas: “Restu ĉe ni, ĉar estas preskaŭ vespere, kaj la tago jam malkreskas”. Ili ne komprenis ke la tago de la resurekto estas la tago ‘unu’. La evangeliisto uzis la saman terminon kiun oni uzas en la libro Genezo por indiki la kreon. La ‘tago unu’ estas la tago de la nova kaj definitiva kreo al kiu ne sekvos aliaj tagoj, do ne estos sunsubiro .

Sed Jesuo konsentas kaj “Li eniris”. Kien? Oni tion ne diras. “Kaj li eniris, por resti ĉe ili”, sed oni ne diras en la vilaĝon; Jesuo ne eniras en la vilaĝon kiu estas la loko de la tradicio kaj la loko de la pasinteco. Kaj jen la evangeliisto kiu prezentas al ni la saman scenon pri la lasta vespermanĝo.

Kaj, por kompreni tion kio sekvos, ni devas rememori ke Sankta Luko estas la sola evangeliisto kiu aldonas al la vortoj de Jesuo: “ĉi tion faru por memorigo pri mi”, en la epizodo pri la lasta vespermanĝo. Tiam Jesuo “prenis la panon, kaj ĝin benis kaj dispecigis kaj donis al ili”. Temas pri la samaj gestoj, la samaj agoj de la lasta vespermanĝo. Jesuo, la filo de Dio fariĝas pano kaj

dispecigas sian vivon por la homaro, ĉar tiuj kiuj Lin akceptas kaj kiuj kapablas fariĝi pano kaj dispecigi sian vivon mem por la aliuloj, tiuj fariĝu filoj de la sama Dio.

Kaj jen ke: “iliaj okuloj malfermiĝis”, nome revenas al ili la memoro, “kaj ili rekonis lin”. Kaj tio, kion la evangeliisto volas diri al ni kiel anoncon de la resurekto: - Oni rekonas Jesuon kiam oni prenas lian panon kaj oni fariĝas pano por la aliuloj. Kiam oni dispecigas la panon por sin doni al la aliaj homoj, tiamaniere oni elprovas la Kriston resurektintan.

Kaj tamen jen ili kiuj revenas al Jeruzalemo, kaj ĝi aperas la trian fojon; ili estas ankoraŭ kunigitaj al loko de la religia institucio, ili bezonos ankoraŭ multe da jaroj antaŭ ol ili sin liberigu je ĝi, kaj ili rakontas al la disĉiploj” tion, kio okazis sur la vojo**”** kaj jen la grava eldiro.: “kaj kiamaniere li rekoniĝis al ili en la dispecigo de pano”.

Jesuo diris “ĉi tion faru por memorigo pri mi”; ĉiufoje kiam pastro dispecigas la panon kiu estas Jesuo, sed eĉ la pano kiu estas la kredanto kiu sin dispecigas por la aliuloj, tiam oni havas la eblecon elprovi la vivantan Kriston, kiu vivas kaj donas la vivon.

Jen per tiuj ĉi vortoj mi bondeziras al vi ĉiuj Feliĉan Paskon!